

Jean de La Fontaine,
La cikad' kaj la formik'

tradukita de Manfredo Ratislavo

Sonis dum somer' kantad'
De cikad'.
Kiam venis la jarfin'
Sen proviz' ĝi trovis sin;
Ĉar ne estis ie de
Muŝ' aŭ verm' pecet', pro ve'
Kaj malsat' ĝi turnis sin
Al Formik', la najbarin',
Ŝin petante pri paner';
Ĉar grandegis la mizer'.
"Ĝis la nova kant-sezon'
Iĝos ja de mi redon',"
Ĵuris ĝi, "kaj pagos mi
Interazon ĝis Juni'!"
La formiko, kiu vere
Ne pruntedonon ŝatis tre,
Diris: "Mi ĝin donos ne!
Kion faris vi somere?" -
"La pasantojn per muzik'
Mi ĝojigis ĝis aŭtun'."
"Mi tre ĝojas, dancu nun!"
Diris tiam la formik'.

...

Jean de La Fontaine,
Cikado kaj formiko

tradukita de Antoni Grabowski

Kantis dum somer' sen fin'
Cikadin'.
Kiam frosta vento blovis
Sen provizo ŝin ektrovis,
Sen malgranda eĉ pecet'
Da muŝeto aŭ vermet';
La malsato pelis ŝin
Al najbara formikin'.
Kaj ŝi petis kun insisto:
"Donu grajnojn por ekzisto
Ĝis la nova jar-sezon'.
Mi vin pagos, laŭ ordon',
En Aŭgust', pro best-honor',
La procenton kun valor'."
Ke ne pekas formikino
Per pruntego, estas vere;
"Kion faris vi somere?"
Diris ŝi al pruntulino.
- "Tage, nokte al venantoj,
Ne mallaŭdu - kantis mi."
- "Kantis? - gaja jen meti'!
Nun ekdancu post la kantoj!"

...

*Traduko de la Franca poemo “La Cigale et la Fourmi” de JEAN DE LA FONTAINE (*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983.*

Arg-549-1105 (2010-07-09 23:08:07)

*Traduko de la Franca poemo “La Cigale et la Fourmi” de JEAN DE LA FONTAINE (*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-549-1108 (2014-03-16 17:39:47)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi tradukon en http://www.babelmatrix.org/works/fr/La_Fontaine,_Jean_de/La_cigale_et_la_fourmi/eo/5026-Cikado_kaj_formiko. Ĝi troviĝas ankaŭ en la retejo de la usona esperantisto Don Harlow <http://donh.best.vuh.net>. Pri la tradukinto vidu la vikipedion retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski. Vidu ankaŭ: http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado_kaj_formiko.